

LA LAMPIRO


62-a jaro, numero 167, 2021: 1

Omâge al la esperantistino
Doroti Guiro Marino

VIVA GAZETO

de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

"Viva Gazeto"
de EASP aktiviĝas



Fondusoj de EASP

Se eblas al vi,
konsideru la eblecon
subteni la asocion
per mondonaco.

Konatiĝu kun niaj fondusoj:

easp.org.br/asocio/doacoes



LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 167, 2021: 1

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.
Subtena membro.....R\$ 300,00.
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario: José Roberto Tenório

2-a Sekretario: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasisto: Maria Delza Macabu

Direktoro pri propagando: vaka

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

ENHAVO

7

Omaĝe al la
esperantistino Doroti
Guiro Marino

12

La Ŝultroj Eltenas La
Mondon

21

Filozofio de
osciloskopo

13

La eksplodo de ŝako

23

Lingvaj Respondoj

8

Aĉetebla feliĉo

15

La historio de rolulo

24

Recenzo:
Cyrano de Bergerac

18

Joĉjo Petolas

10

"Viva Gazeto" de
EASP aktiviĝas

19

Toleremo: tiel necesa
kiel nekomprenata

26

La Nekredebla
Historio de la Insulo
de la Rozoj



Henrique Boney

Vortoj de la prezidanto

Karaj samideanoj,

Kun plezuro mi kontaktas vin por esprimi mian feliĉon, ke nun ni vidas lumon fine de la tunelo, pro alveno de vakcino kontraŭ la kronviruso. Por rekomenci la vivon, estas tre grave, ke ni akceptu la vakcinon. Nur tiel ni povos renkontiĝi en la sidejo de EASP, en niaj kongresoj, por babilado.

Temas pri ĝoja momento por ni ĉiuj, sendepende de politikaj sintenoj. La vivo estas donitaĵo, kaj ne indas perfidi ĝin. Dume, ni plu prudente lavu niajn manojn, konservu inter ni distancon fizikan, surportu maskojn kaj frotu nin per alkoholo.


Mi pensas, ke ankoraŭ ĉi-jare ni povos rekontiĝi ĉeeste. Mi dankas tiujn, kiuj apogis nin dum la pasinta jaro, kaj mi esperas pluan apogadon. Bonvolu resti apud ni!

Sendu al ni per iu ajn rimedo mesaĝon, kaj esprimu viajn ideojn pri EASP. Ni faros tion, kion ni povos, por kontentigi viajn dezirojn.

Kaj ne forgesu ricevi la vakcinon.

Dankon, ke vi estas parto de EASP!

ESMERALDO ALENCAR LIMA



Vortoj de la redaktanto

Komenciĝas nova jaro, kaj eĉ se la nova kronviruso ne permesas multajn celebroyojn, tamen nia Lampiro devas denove ekflagri. Malgraŭ la sanitaraj problemoj, la jaro 2020 ne estis entute malfekunda. En la virtuala mondo nia Esperanta mondo viglas kaj eĉ kreskas. Ankaŭ EASP partoprenas en tiu agado per interreto, kaj pri tio mi atentigas vin, karan leganton, pri nia teksto en ĉi tiu numero de la revuo “VIVA GAZETO” DE EASP AKTIVIGĜAS“. Ekster nia verda mondeto, malveraĵoj tamen svarmas en interreto, kaj pri tio ni proponas, ke vi atentu pri la ”Lingva Respondo“ de Francisco Wechsler. Cetere, nia tuta fasko da tekstoj en ĉi tiu Lampiro meritas vian trarigardon. Kaj certe viaj komentoj estas bonvenaj. Bonan legadon!

PAULO SÉRGIO VIANA

Omaĝe al la esperantistino Doroti Guiro Marino

MARIA APARECIDA TUON

La 2-an de Februaro 2021, forpasis la brazila esperantistino Doroti Guiro Marino, membro de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP). Dum pluraj jaroj ŝi multe laboris por la disvastigado de la internacia lingvo, kaj multe kontribuis al studado de filozofiaj temoj en Homaranisma grupo. Sentema poetino, ŝi verkis la libron "Se mi estus birdeto", poemoj pri

amo al naturo kaj homoj, kiujn ŝi plurfoje oportune deklamis en lokaj kaj internaciaj E-kongresoj. Ŝi estis emerita instruistino, kaj nuntempe elstara preleganto en Spiritismaj rondoj. Ni registras tie-ĉi nian dankon al Doroti pro ŝia valora amikeco kaj sindediĉo al Esperanto. Ŝi certe daŭre vivos en niaj sopiraj kaj karesaj memoroj. ■

MARIA ANTÔNIA SOBRAL

(Mesaĝo sendita al Esperanto-grupo de Pouso Alegre)

Saluton, ambasadejanoj! Hieraŭ forpasis karega esperantista amikino mia, Doroti Guiro Marino, el EASP, viktimo de kovim-19. Ni kune partoprenis kursojn,

kongresojn, ĉu brazilajn, ĉu universalajn, multe vojaĝis kaj amuziĝis. Ŝi verkis la libron "Se mi estus birdeto" de poemoj, kiujn ŝi deklamis diversfoje en kongresoj. Dankon al ŝi pro la kontribuo al esperanta literaturo kaj pro ŝia granda koro plena je amo! ■

SIDNEA DA CONCEIÇÃO BEALL

Doroti Guiro Marino, 69-jara, forpasis la 2-an de februaro 2021 en la ĉefurbo San-Paŭlo pro kovim-19. Ŝi estis emerita instruistino pri Matematiko en mezgradaj lernejoj. En la Spiritisma movado, ŝi agadis interalie kiel edukistino, preleganto kaj gvidanto

ĉe Spiritisma Domo Francisko el Asizo.

Krom esperantistino, ŝi estis poeto kun unu libro publikigita: la dulingva verko (portugala-esperanta) "Se mi estus birdeto". Ŝi estis membro de EASP ekde 1994. ■

WALKÍRIA VERNACCI LARA RÚBIO

Doroti Guiro Marino, esperantistino, idealisto kaj membro de EAP. Ŝi vizitis nian asocion ĉiun lastan sabaton de la monato por ĉeesti prelegojn,

tagmanĝojn, jarfine la aranĝon Zamenhof-Tago kaj aliajn eventojn favore al nia asocio. Ŝi partoprenis en la Universala Esperanto-Kongreso (Aŭstralio) akompane de

sia kuzino Alda. Tie ŝi belege reprezentis Brazilon en la Arta Vespero per deklamado kaj dancado, kiel ni povis vidi poste per video, kiun ŝi kunportis kaj vidigis al ni okaze de sia reveno. Ŝi skribis la libron "Se mi estus birdeto". Krome, ŝi partoprenis en la homaranisma grupo, fondita de Walter Francini, kiel oni povas konstati per la protokoloj konservataj ĉe Aparecida de Lurde de Lucas. Tiuj kunvenoj okazis en



diversaj lokoj kaj en kelkaj okazoj en ŝia domo mem, en la kvartalo Freguesia do Ó, en la ĉefurbo San-Paŭlo. Ni tre ĝoje partoprenis en tiuj kunvenoj. Laste, ŝi estis tia esperantisto, kiu per agoj lasis travidebla sian amon al la lingvo de Zamenhof.

En tiu alia vivoflanko, kie nun ŝi troviĝas, certe ŝi estas tre feliĉa ĝuante la ĉeeston de geamikoj je idealo. Tion mi imagas kaj ŝi ja meritas. ■

Mesaĝo

Aĉetebla feliĉo

LADISLAU AFONSO



Antaŭ kelkaj monatoj mi aĉetis belan bildon faritan per farba oleo sur tolaĵo. Ĝi temas pri pejzaĝo bele pentrita. Je la unua plano la strato invitas nin eniri tiun lokon kaj eĉ loĝi ĉe domoj lerte lokitaj laŭ la vojo.

Kiam mi promenis ĉe foiro, tiu pentraĵo allogis min. Poste mia okulo deflankiĝis kaj trovis alian similan sed pli ravan. KREDU, ke tiu lasta

enhavis kvar dometojn. Du el ili estis preskaŭ nepercepteblaj. Kaj oni povus trovi ilin ĉe la pinto de la malgranda arbo iom bruneta. La unua estis nur du domoj.

“Kia feliĉo!”, mi pensis. Vivi en tiu bildo. Loĝi ĉe unu el la domoj kaj promeni inter najbaroj, kiuj verŝajne estas esperantistoj aŭ se ne oni povos lernigi ilin.

— Kiom kostas tiuj pentraĵoj? Mi demandis, interesita.

— Tiu kun du domoj nur ducent realojn - la pentristo respondis.

— Kaj la alia kun kvar dometoj? - mi iom senpacience demandis.

Per rideto iom flava la pentristo diris: — Tiu ĉi kun pliaj dometoj estas iom pli kosta.

— Ĉu vere? — Mi aĉetas aferojn per impulsigemo. Do la prezo en tiu cirkonstanco ne gravis.



Mi jam imagis promeni tra la kampo en la bildo.

Manĝi kukon kaj trinki kafon ĉe la domoj, kiuj aperas sur la monto, kiam mi vizitos najbarojn.

Imagu, ke eĉ fumo eliris el kamentubo tra tegmento. Tio ĉi akriĝis mian imagpovon.

La flava arbo estis por mi la preferata. La bildo eterniĝis tiun mirindan kaj diafanan floron. La domo sub ĝi estis de mi jam elektita por loĝi. Ĉiumatene tra la fenestro mi rigardos tiun belan floron kaj koloron, dum mi matenmanĝos.

Rigardu pri atente. Vidu tiun rozkoloran arbon apud la arbaro. Sub ĝi mi imagis ĝui esperantan libron. Legi la tutan verkaron de Zamenhof kaj tie mi forlasos mian lacigitan organaron ripozi ĝis dormeto. Se dum la dormo mi sonĝos pri la libro kiun mi ĵus mendis kaj atendas la alvenon, ne surpriziĝu.

Mi esperas ke vi kiel mi deziras instrui Esperanton. Tiu libro, kiun mi mencias, estas la Manlibro pri instruado de Esperanto en sia nova versio.

Ne timiĝis min jaguaroj nek serpentoj ĉar tiaj bestoj ne ekzistis en mia revo.

Do la feliĉo ne estis tre multekosta.

Hodiaŭ la pentraĵo pendas sur la muro, forgesita. Ĉu mia feliĉo rustiĝis? Versajne la polvo iom grizigis ĝin.

Lacerteto loĝas malantaŭe. Ĉu tiu moviĝema besteto estas pli feliĉa ol mi? Ĉu nokte ĝi eniras tiun bildon kaj vivas la vivon, kiun mi revis? Aŭ ĉu ĝi moviĝas nur por vivteni sin kaj ankaŭ ne sin fordonas al ĝuo de magia peniko de Kreinto? Kiel mi ... Kiel vi...

Pro multaj bagatelaĵoj la vivo forflugas kaj la flava kaj rozkolora arboj atendas nin...

Ĝis kiam? ■



"Viva Gazeto" de EASP aktiviĝas

PAULO SÉRGIO VIANA

Dum la kronviroza pandemio multaj virtualaj agadoj okazas en Esperanto, kiel ĉiuj scias. Tiu fenomeno konsiderinde ampleksigis la atingon de nia lingvo inter ĝiaj uzantoj. Homoj, kiuj neniam povis (pro diversaj kialoj) partopreni en internaciaj eventoj, tamen tion spertis en la jaro 2020. Supozeble, en estonta tempo, sendepende de sanitaraj problemoj, oni devos daŭrigi tiun sistemon de demokratigo de niaj kongresoj. Krome, sennombraj filmetoj, prelegoj, komentoj, kursoj, diskutoj kaj babiladoj estas nun disponeblaj en interreto. Tio montras la vigecon de nia lingvo, de nia komunumo. Ni ĉiuj, Esperantistoj, povas kontribui al la vivanteco de nia movado, ĉu per aktiva produktado de programeroj, ĉu per aktiva partopreno en virtualaj eventoj, ĉu per simpla spektado kaj komentado.

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo aliĝis al tiu bela agado. Dum la lastaj monatoj okazas **EASP-Kafejo**, ĉiusabate, je la 17-a horo, por libera babilado dum unu horo. Se vi interesiĝas, petu ligilon al annalightworker@gmail.com.

Ĝi jam havis en jutubo sian kanalon "Viva Gazeto", kiu tamen longe dormetis, neaktiva. Dum la lastaj monatoj, ĝi revekiĝis. Ekzemple, publikiĝis en ĝi **prelegoj** okazintaj en la ĉiumonataj kulturkunsidoj de la asocio. Krome, kreiĝis nelongaj rubrikoj, kiuj ŝajnas interesaj pro sia vigla enhavo: —**"Esperanto-Notícias"**: portugallingvaj podkasto (en la voĉoj de Anna Lobo kaj Audino Rashi), enhavantaj aktualajn informojn pri Esperanto, taŭgajn por ĵurnaloj, revuoj, radistacioj kaj aliaj amaskomunikiloj. Ni diskonigu ilin en la ekstera medio!

— **"Lingva Provoko"**: kelkminutaj filmetoj, en kiuj Paulo S. Viana prezentas kuriozaĵojn kaj defiojn pri nia leksiko kaj lingvostilo.

— **"Kion vi Ŝercas?"**: kelkminuta prezento de ŝercoj kaj anekdotoj, kiel amuza maniero sobre kaj precize uzi nian lingvon en viveca maniero. Per tia publikigado, Viva Gazeto jam havigis al si multajn novajn abonantojn. Ni invitas vin, kara leganto, spekti, signi kaj aboni. Kaj se vi havas proponojn pri aliaj eblaj rubrikoj, bonvolu skribi al ni. ■



Tom da poezio

Paulo S. Viana

Carlos Drummond de Andrade[†] estis unu el niaj plej grandaj brazilaj poetoj. Li naskiĝis en la urbo Itabira, en ŝtato Minas Gerais, en la jaro 1902, kaj mortis en 1987. Li diplomigis pri farmacio, sed ĉiam laboris kiel ŝtatoficisto. Lia vera pasio, ekde juna aĝo, estis literaturo. Li vigle partoprenis en la modernisma movado, en stilo objektiva kaj konkreta. Li verkis ankaŭ multajn ĵurnalajn kronikaĵojn, rakontojn kaj infanlibrojn. Ĉi-sube ni prezentas proponon de traduko de unu lia tre densa poemo. Kritikoj bonvenaj.

OS OMBROS SUPORTAM O MUNDO

Chega um tempo em que não se diz mais: meu Deus.
Tempo de absoluta depuração.
Tempo em que não se diz mais: meu amor.
Porque o amor resultou inútil.
E os olhos não choram.
E as mãos tecem apenas o rude trabalho.
E o coração está seco.

Em vão mulheres batem à porta, não abrirás.
Ficaste sozinho, a luz apagou-se,
mas na sombra teus olhos resplandecem enormes.
És todo certeza, já não sabes sofrer.
E nada esperas de teus amigos.

Pouco importa a velhice, que é a velhice?
Teus ombros suportam o mundo
e ele não pesa mais que a mão de uma criança.
As guerras, as fomes, as discussões dentro dos edifícios
provam apenas que a vida prossegue
e nem todos se libertaram ainda.
Alguns, achando bárbaro o espetáculo
prefeririam (os delicados) morrer.
Chegou um tempo em que não adianta morrer.
Chegou um tempo em que a vida é uma ordem.
A vida apenas, sem mistificação.

LA ŜULTROJ ELTENAS LA MONDON

Alvenas tempo, kiam oni jam ne diras: mia Dio.

Tempo de absoluta purigo.

Tempo, kiam oni jam ne diras: mia amo.

Ĉar amo montriĝis senutila.

Kaj la okuloj jam ne ploras.

Kaj la manoj teksas nur la krudan laboraĵon.

Kaj la koro estas seka.

Vane virinoj frapos la pordon, vi ne malfermos.

Vi restis sola, estingiĝis la lumo,

sed en ombro viaj okuloj lumas grandegaj.

Vi tuta estas certa, vi jam ne scias suferi.

Kaj vi nenion atendas de viaj amikoj.

Tute ne gravas maljuneco, kio estas maljuneco?

Viaj ŝultroj eltenas la mondon

kaj ĝi ne estas pli peza ol la mano de infano.

Militoj, malsatoj, disputoj en loĝkonstruaĵoj

nur pravas, ke la vivo pluas

kaj ankoraŭ ne ĉiuuj liberiĝis.

Kelkaj trovas la spektaklon barbara

kaj preferus (la sentemaj) morti.

Alvenis tempo, kiam estas vane morti.

Alvenis tempo, kiam la vivo estas ordono.

La vivo, nur, sen mistifiko.

La eksplodo de ŝako

THAIS JACÓE SOARES (thaisjacoesoares@gmail.com)

Kvankam ŝako ekzistas de ĉirkaŭ 1500 jaroj, 2020 alportis novaĵojn al ĝi. Ĉeestaj ŝakaj turniroj estis nuligitaj, kaj Monda Ŝaka Turniro estis prokrastita. Tamen ĉi tiu jaro povus esti la plej granda en la ŝaka historio.

Unue, la fakto, ke homoj devis resti hejme pro la kvaranteno pliigis postulon pri la ludo en ĝia reta versio. Efektive, la interreta platformo Chess.com (la plej granda el ĉiuj) ricevis ĉirkaŭ 1 milionon da membroj en ĉiu monato, ekde marto. Sed alia afero ankaŭ kontribuis al la eksplodo de la ludo. Pro la publikigo de *La dama gambito* ĉe Netflix en novembro, la nombro da novaj membroj atingis mirindajn 2,8 milionojn en tiu monato! Ankaŭ ina reprezentigo kreskis. Antaŭ la Netflix-miniserio, nur 22% el la ludantoj en la menciita platformo estis inoj. Post ĝi, ĉi tiu nombro altiĝis al 27%. En sporto superregata de la vira publiko, tio estas bonega realigo.

Bazita sur la samnoma libro de Walter Tevis (verkita en 1983), *La dama gambito* rakontas pri orfa knabino, Beth Harmon, kiu lernas kiel ludi ŝakon en la orfejo. Estante mirinfano, ŝi supreniras al la plej altaj rangoj en la mondo per sia obsedo

kaj celkonscio. Eble ĉar la miniserio disponeblas ĉe la populara elsendflua platformo, *La dama gambito* certe estis esenca por popularigi ŝakludon. Ĝi ne estas, tamen, la sola nek la unua apero de la ludo en fikcio. Unu el la plej famaj ekzemploj estas novelo de Stefan Zweig titolita *Ŝaknovelo*. La aŭstro, kiu parenteze elektis Brazilon kiel sian lastan hejmon, verkis la libron en 1941. La rakonto temas pri kaptito de la nazia reĝimo, kies sola ŝatokupo estas legi kaj parkeri libron kun rimarkindaj ŝakludoj de majstroj. Kiel en *La dama gambito*, la libro traktas la efikon de la ludo sur la vivo de la rolulo kaj la kreskanta obsedo, kiun



ĝi kaŭzas. Bonŝance, la verko estis tradukita el la germana de Vinko Oŝlak kaj eldonita de Esperanto-eldonejo Inko.

Aliaj ekzemploj menciindaj estas libro de renoma verkisto Vladimir

Nabokov, kiu nomiĝas La Luĵina defendo, kaj libro Lisa: ŝakromano, de usona grandmajstro Jesse Kraai. La unua estis tradukita el la rusa al la angla kun helpo de Nabokov mem. Ĝi sekvas trajektorion de Luĵino, kiu estas dediĉita al la ludo ekskluzive de sia reala vivo. La jena, siavice, temas pri paria kaj frumatura knabino kiu entuziasmiĝas pri ŝako kaj obsediĝas de ĝi.

La ripetiga motivo en ĉiuj cititaj ekzemploj estas jena: la eblo eskapisian vivon. Sed estas ankaŭ la forta fascino pri la ludo. Multfoje oni diris, ke ŝako estas facile lernebla ludo, sed malfacile majstrebla. Ĉu tial estas tiel facile obsediĝi? Ĉu pro la konkurenco? Aŭ eble pro la miriga kvanto da horoj, kiujn oni bezonas dediĉi al ĝi por antaŭeniri? Sendepende de la respondo, ŝako povas fukcii kiel ilo por ekzerci la

menson kaj amikiĝi tra la mondo. Se vi volas lerni kiel ludi, plibonigi vian ludon aŭ simple rete praktiki, vi povas iri al la retejo de Chess.com, kie senpaga abono disponeblas (kun iuj limigoj). Vi ankaŭ povas elekti la tute senpagan platformon Lichess.org, kie eĉ eblas kontakti rangigitan privatan instruiston. Ĉu ni ludu?

Referencoj:

<https://www.chess.com/article/view/vote-for-the-2020-chess-com-awards>

<https://www.bloomberg.com/graphiccs/2020-chess-boom> ■



*La verkisto de ĉi tiu rakonto estas Eduardo Garcia,
Studento de Sociaj Sciencoj en la
Federacia Universitato de Suda Rio-Grando, Porto-Alegro, Brazilo.
Li fariĝis esperantisto antaŭ nelonge
kaj verkis ĉi tiun rakonton por plibonigi
kaj plifortigi sian Esperanto-konon.*

La historio de rolulo

La konscio

Rolulo estas homo kiu havas demandojn pri sia vivo. Lia personeco estas tia, ke li povas iom furioziĝi kiam li ne scias la kialojn. Li estas tute sola en sia domo, en sia vivo, kaj ĉiam demandas sin mem... Kio estas mi? Kiu estas la celo de mia ekzisto? Li estas ankaŭ tre kreema homo, kaj multe faris en sia mallonga vivo.

Iam li forte rimarkis ion pri sia vivo. — Kies estas tiu voĉo kiu parolas pri mi kaj pri mia vivo? Kiu diris al vi ĉiuj ke mi estas nomata Rolulo? Jes, tiu estas mia nomo sed kiu donis al vi tiun rajton skribi pri mi?

“Mi estas la kreanto, la kreanto de ĉi tiu rakonto, mi estas via kreanto, la kreanto de via vivo.”

— Ĉi tiu rakonto? Ĉu vere? Sed kiu estas la celo? Jam en la komenco de la rakonto mi konstatis la evidentan fakton, ke mi ekzistas en ĉi tiu dimensio.

“Jes, vi pravas. Tio veras... Vi rajtas ekzisti nur ĉar mi tiel volas. Vi estas nur rezulto de mia volo” - diris la verkisto.

— Ĉu vi estas la tiel nomata Dio?

“Fakte, mi havas multege da nomoj. La homoj nomas min diversmaniere.

Vi povas doni al mi la nomon verkisto, Dio, rakontisto, aŭ io ajn kion vi volas.”

— Tamen mi ne konsentas! Mi ne volas esti kreata por kontentigi iun ajn.

“Tio estas la vero, mia kara. Ĉu vi volas aŭ ne, tio tute ne gravas.” Rolulo fariĝis furioza kaj poste komencis diri malbonajn vortojn: Vi tute ne rajtas kontroli min tiu-maniere! — diris Rolulo. — Kiu donis al vi la rajton?!

“Rolulo, tiel vi iras nenien. Vi restos kun mi, laŭ mia volo, poreterne.” Bone, do mi finas mian ekziston nun. Mi mortigas min mem.

“En tiu kazo, mi povas krei vin denove kaj denove kiom da fojoj mi volas.”

Nee! Tio ne eblas. “Jes, tio eblas ĉar mi estas via kreanto, ĉu vi forgesis? Mi regas vian vivon.”

— Do, kion vi volas de mi? “La celo de via vivo estas kontentigi min.”

Post kelkaj minutoj da longa pripensado, Rolulo diras: — Do, mi pripensas manieron detruvi vin.

“Guste! Vi havas la eternon por fari tion. Sed nun vi devas labori por mi.”

— Kion mi devas fari? — Vi devas pensi anstataŭ mi, ĉar mi estas iom pigra — diris la verkisto — Vi devas

doni al mi Nobel-premion.
Ne, tion mi ne deziras... Vi devas doni al mi unu Jabuti-premion: La plej grandan premion en la brazila literaturo. Sed mi havas nek talenton, nek ideojn. ... Do, vi devas labori anstataŭ mi, tiel mi volas.

— Kvankam mi estas nur rolulo en la rakonto. Vi eĉ ne havis imagon por doni al mi pli belan nomon: Mi nomiĝas **Rolulo**. Mi ne rajtas havi povon pri la historio... ĉu ne?

“Normale, ne. Sed mi estas tre nekreama verkisto kaj krome mi estas pigra. Rilate al via nomo, ĉu vi havas pli bonan ideon, inteligentulo?” - la verkisto ironie diris.

Jes, ja. Vi donas al mi kreemecon, do mi ja havas belajn ideojn.

“Do, kiu estas via ideo?”

— Mia nomo devas havi sencon al vi... Mi ne konas vin, sed mi supozas ke vi ŝategas librojn, ĉu? Vi estas la verkisto, ĉu ne? Kiu estas via plej ŝatata libro?... Donu al mi iun nomon rilate al tio... simple tiel!
“Ho! Mi ne povas nomi vin Raskholnikov ĉar tio jam ekzistas en la rusa literaturo. Aŭ... eble, mi havos nigran katon aŭ korvon kaj mi nomos vin Poe... Tio estas belega nomo.”

“En tiu kazo, ni pensos kune... Ni komencu denove. Kie vi volas naskiĝi? En kiu jarcento? En kiu socio? Justa, maljusta? Pasinteco, estonteco?”

— Bone, tio ne estas facila ĉar vi devas doni al mi ne nur kreemon sed ankaŭ inteligenton kaj scivolemmon por scii pli da okazaĵoj en la Historio...

Bone, en tiu kazo mi komencu denove.... — Jes, konsentite!

La deziro de Poe

Poe estas homo, tre inteligenta kaj kreema. Li naskiĝis en la jaro 1984. Li antaŭ nelonge komprenis ke li en certa maniero ekzistas. Sed ne scias pli. Kaj restas la duboj. Lia nigra kato estis lia sola kunulo. Li ĉiam diras al la kato:

— Tre aminda kato! Vi estas tre petolema, sed malgraŭ tio, mi tre amas vin.

Sed ne nur la kato sekvas lin ĉien, kien li iras... Ankaŭ la duboj pri lia ekzisto kaj lia vivo.

— Kiu estas la celo de mia vivo? Kial mi ekzistas en ĉi tiu dimensio? Ĉu mi devas trovi iun por naskigi etulojn? Hoo, terura ekzisto, mankas al mi io... Sed kio? La respondo, eble, aŭ la ĝusta demando?

— Ho Kreanto, vi donis al mi tro da soleco... Mi sentas min eksterterano en ĉi tiu planedo... Mi konas neniun krom mi.

“Bonvolu... Ne estu tiel. Viaj duboj tre enuigas min. Vi estas la respondeculo pri via vivo. Vian agadon faras nur vi.”

“Se io al vi mankas, mi povas vin helpi. Mi povas doni ĉion al vi.

“Ĉion kion vi volas. Ĉu vi volas esti riĉulo? Mi povas krei tion. Ĉu vi volas esti pli bela? Mi volonte povas fari. Ĉu vi deziras havi kunulon? Mi povas krei iun. Ĉu vi volas havi ion ajn? Mi kapablas fari...”

“Nur diru al mi kio mankas al vi... Kaj mi tuj faros.”

Post kelkaj minutoj da pripensado, Rolulo diris:

— Mi ne volas ion ajn. — Rolulo spiris forte kaj diris — Mi sopiras kaj forte deziras ... la REALAN VIVON... Jes! Tion mi volas... Nenion plu ... Mia deziro estas fariĝi homo kaj forlasi ĉi tiun dimension.. Jes! Estas tio, kio mankas al mi... Mi deziras esti parto de la homaro!

“Tamen tion mi ne kapablas fari... Mi povas krei per la imago sed ne ion vivan. Vi ekzistas nur en tiu freneza rakonto kaj en neniu alia loko!” — diris la verkisto.

“Vi ekzistas nur en mia imago...”

— Kaj se vi publikigos la rakonton, mi povos ankaŭ esti en la imago de la legantoj.

— Jes, vi pravas.

La okazaĵo UNU — FINO —

En la noktomezo, plena je fulmoj kaj tondroj, en aĉa nokto, kiam la verkisto trankvile en sia libro enprofundiĝis, kaj historion formulis, el sia pordo, li ion aŭskultis... Tik tok — tik tok

“Io tiktokas je la pordo de la enirejo. Kiu povus esti en ĉi tiu horo...?” — diris la verkisto.

“Kiu flapas al mia pordo en ĉi tiu horo? Scivola mi estas, ĉar mi deziras malkovri ĉu mi estas viva homo aŭ estas mia imago kiu ludas per mi... Ĉu ĝi estas birdo kiu frapas sur mia pordo? Aŭ eble korvo, kiu petas

eniron en mian ĉambron? Eble iu ajn.”

“Sinjoro, aŭ sinjorino, mi pardonpetas, ĉar mi estis preskaŭ dormanta kaj vi alvenis frapanta sur mia, sur mia ĉarma pordo.” Li diris kaj li stariĝis por malfermi la pordon.

“Malfermi la pordon, mi tuj faros!” — pensis li.

“Rolulo, estas vi!!! Ĉe mia pordo vi staras!!” — Saluton!! — diris Rolulo.

Mirinde, io nekomprenebla okazis kaj Rolulo fariĝis viva homo.

La okazaĵo DU — Alternativa fino —

La verkisto havas la kutimon trinki multege da kafo. Fakte, ĉiutage, li faras tiel. Tago post tago, semajno post semajno, li ĉiam havas apud si glasojn da kafo, kiujn li regule trinkas. Tamen pro tiu kialo, estis kaoso. Grandega kaoso. Subite Poe diris:

— Mia gorgo kaj buŝo estas plenaj! Kio okazis? Hooo! Mi ne povas spiri pluuuu! Tio estas la gusto de la kafo..! Kiel terura!!

Kiam la verkisto skribadis la trian ĉapitron, io okazis. Li akcidente verŝis la kafon sur la tekston, kiu enhavis Rolulon kaj la historieton ... Tio subite mortigis Rolulon kaj neniigis la rakonton. La rakonto ne plu estas legebla.

Verkisto, la 11-an de decembro 2020



Iom da humoro

Joĉjo Petolas

Je Kristnasko, eta Joĉjo gajnis novan biciklon. Kaj li tuj provis per ĝi.

— Vidu, panjo, mi biciklas uzante nur unu manon!

Li iras kaj revenas:

— Vidu, panjo, mi biciklas ne uzante la manojn!

Li reiras kaj revenas:

— Vidu, panjo! Mi biciklas sen la dentoj!

Instruistino demandas en la klaso:

— Atentu, infanoj! Sur unu mano mi havas kvar pomojn. Sur la alia mano, mi havas ses pomojn. Kion entute mi havas?

Joĉjo respondas:

— Grandegajn manojn, instruistino!

Joĉjo envenis hejmen tre perturbita, kaj kriis al sia patrino:

— Panjo, knaboj en la lernejo mokas, ke mi estas senatenta.

La virino, konsternita, respondis:

— Joĉjo, vi loĝas en la apuda domo!...

Iom da filozofio

Toleremo:

tiel necesa kiel nekomprenata

José Mauro Progiante

Per ĉi tiuj vortoj Émile-Auguste Chartier (Alain) difinis la toleremon: “Speco de saĝeco, kiu superas la fanatikismon, tiun teruran amon al la vero.”

Nuntempe estas facile trovi homojn, kiuj deklaras sin amantoj de la vero. Tio ne estus problemo, se ili ne kredus sin posedantoj de la vero, se ili ne konfuzus opinion kun scio.

Certe la scienco ne havas respondojn al ĉiuj demandoj, fakte ĝi ne kapablas respondi la plej gravajn demandojn, ekzemple pri la ekzisto de Dio, pri la senco de la vivo aŭ pri la moralaj valoroj. Estas do kompreneble kaj respektinde, ke ni havu niajn proprajn respondojn, niajn kredojn. Malgraŭ tio, la konkludoj devenantaj de filozofiumado nenion

pruvas.

Se ne eblas pruvi, ke niaj opinioj, aŭ la opinioj regantaj en nia grupo, estas la plej bonaj, estas espereble, ke ni toleru la opiniojn de la aliaj homoj, de la aliaj grupoj, eĉ se ili aspektas al ni plej strangaj aŭ eraraj. Tio estas toleremo kaj la kolektiva vivo bezonas ĝin, same kiel la interpersona vivo bezonas la ĝentilecon. Toleremo estas virto kontraŭa al fanatikismo, al sektismo, al totalismo. Dum la homoj ne amos aŭ simple ne komprenos unu la aliajn, la toleremo estos provizora solvo por gardi la civilizacion. Per ĝi la homoj povas almenaŭ elteni unu la aliajn.

Tamen oni ne pensu, ke toleremo estas pasiva virto, aŭ ke ĝi rilatas kun indiferenteco. Tute ne.

Estas necese kompreni, ke ne ĉio estas tolerebla, kaj tiu neceso implicas devon rekoni kiam la kontraŭuloj transpasas siajn limojn. Simpla ekzemplo de hejma toleremo helpas klarigi tiun punkton. Patrino toleras kaprican disputon inter siaj gefiloj, dum ĝi estas nekonsekvencna, sed ŝi firme intervenas se tio endanĝerigas iun. Simile, en la socio la toleremo ne taŭgas en okazoj de krimoj, maljusteco ktp. Senlima toleremo estus abomeninda. En plej ampleksa kadro, politika

kaj religia, tio estus malrespekto al viktimoj de torturoj kaj amasmurdoj. Kaj en la persona vivosfero ĝi povus estigi kunkulpecon, ĉar la toleremulo estas tiu, kiu akceptas ion, kion li povus malpermesi. Por decidi, ĉu io estas tolerebla, ni konsideru ne niajn opiniojn, sed la eblajn aŭ efektivajn konsekvencojn de la vortoj kaj agoj de niaj kontraŭuloj. Ni ne toleru nur, se iliaj ideoj iĝas ilo por danĝero. ■



Filozofio de osciloscopo

JAMES PITON (PAULÍNIA-SP)

En Brazilo ni havas la esprimon "trinkejaĉa filozofio", por tiuj, kiuj pretendas pripensadon tamen laŭ ne tre profundaj dimensioj (kion oni povas atendi de alkoholplena menso, ĉu ne?). Jen kelkaj pensoj de mia propra varianto - sen unu guto da alkoholo - la filozofio de osciloscopo.

komputilprogramo. Kiel vi vidas en la bildo, mia programo produktas fizikajn elektrajn eventojn - imagu ŝalti lampon, lasi ĝin ŝaltita 25 ns (25 nanosekundojn) kaj malŝalti ĝin. Tio ripetigĝos post 325 ns, senfine. Rezervu al vi unu sekundon. Dum vi legis ĉilastan frazon, 3 milionoj da eventoj okazis en mia aparato.



En la lastaj tagoj mi denove bezonis tiun aparaton (kiu mezuras laŭ la tempo elektrajn signalojn) por konstati la fizikajn rezultojn de mia

Se mi elektos, ke la eventoj okazu sinsekve, laŭ senpaŭza ŝalto-malŝalto, 40 milionoj ripetigĝas en nur unu sekundo.

Kiom multaj aferoj same okazas dum unu sekundo en la naturo, en la spaco, en niaj propraj ĉeloj! Tio pensigas min (trinkejaĉa stato ŝaltita, sen la alkoholo): la tempo estas valora rimedo, kiu defluas tra niaj manoj. La sekundo, kiu pasis for ne revenos - la tempo ne estas reuzebla kiel akvo aŭ materialoj. Ĉi tiu tago havos nur 86400 sekundojn, el kiuj ni ne vidis ĉ. unu trionon, ĉar

ni tiam dormis.

Kaj ni malŝparas nian ceteran tempon per kvereloj, malbonaj libroj, televidprogramaĉoj! Saĝe uzu vian tempon inter viaj geamatoj, kun bonaj libroj, bonaj filmoj, lernado. Dum mi mem faros tion, mi forgesos pri la kelkmiliardaj eventoj, kiuj okazis post la unua vorto, kiun mi supre skribis. ■



Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando:

Oni proponas diversajn tradukojn por la nun moda anglalingva esprimo *fake news*: *falsa informo*, *falsa notico*, *interreta mensogo*, *malvera novaĵo*, *reta trompaĵo*, *interreta misinformo*, k.a. Laŭ via opinio, kiu estas la plej taŭga traduko en Esperanto?

Respondo:

Ĉiuj ĉi-supraj tradukoj eblas. Vikipedio krome citas la jenajn: *junecaj novaĵoj* (?), *pseŭdo-novaĵoj*, *fripornaj novaĵoj*, *trompaj novaĵoj*, *novaĵaĉoj* kaj *falsaj novaĵoj*. Mia opinie — notu bone, ke mi esprimas personan preferon — la plej taŭga traduko ŝajnas esti *trompaj informoj* (aŭ *trompinformoj*), ĉar temas pri materialo, per kiu oni celas misinformi publikon. ■

Recenzo

PAULO SÉRGIO VIANA

CYRANO DE BERGERAC

de Edmond Rostand

Eldono “Fonto”, 2016.

Se oni rajtus trovi centran ideon en ĉi tiu klasika dramo, oni certe povus elekti frazon, kiun la protagonisto eldiras en ĝia lasta akto: “Sed oni ne batalas kun espero de sukceso!”.

La teatraĵo estas radikale romantika. Cyrano estas figuro de kuraĝo, aŭdaco, forto, fiero kaj idealismo. Li amas poezion kaj por ĝi li celebras la plej rafinitan uzadon de vortoj. Sed lia granda, ridinda, mokata nazo estas konstanta averto, ke li vivas en la reala, materia mondo, plena de vulgareco, egoismo, mensogoj, antaŭjuĝoj, maljusto kaj hipokrito. Kontraŭ tia mondo, li uzas sian glavon. Kiel nevenkebla skermanto, li alfrontas cent kontraŭulojn kaj ilin ĉiujn forpuŝas. En unu el la plej brilaj scenoj, li glavumas kontraŭ malamiko kaj informas, ke dume li

kunmetos poemon - kaj fine de la lasta verso li pikos la kontraŭulon. La motivo por montri, ke la mondo de ideoj estas pli grava ol tiu de fizika forto estas lia amo al lia kuzino Roksana. Ŝi tamen amas lian amikon Kristiano, sed ĉi tiu bela simplulo ne kapablas diri al ŝi sufiĉe sorĉajn amvortojn. Cyrano do proponas sub balkono suflori al Kristiano la poezion, kiu ravas Roksanan. Poste, el militkampoj, li sendas al ŝi amleterojn, nome de sia amiko. Jen la iom naiva, sed fervora indiko: vera amo estas kuniĝo de animoj, ne de korpoj, kaj vera amanto volas la feliĉon de sia amatino, pli ol sian propran feliĉon. La beleco de poezio, de altaj ideoj, de sindediĉo al noblaj principoj, kaj precipe al libereco de pensoj, valoras ĉian rezignon pri la rekono flanke de homoj.

Laŭsence, Cyrano estas speco de nova Donkiĥoto. Li vivas en sia propra mondo de altaj principoj. Oni povas konsideri ĝin tipa produkto de la 19-a jarcento: la unua enscenigo

okazis en 1897, kiam humanismaj konceptoj trovis favoran grundon en Eŭropo.

Por verki ĉi tiun dramon, Edmond Rostand (1868-1918) inspiriĝis je samnoma poeto kaj filozofo el la 17-a jarcento, kiu kutime kontestis siatempajn intelektulojn. La heroo de Rostand tamen estas tute fikcia figuro.

La originala verko de Rostand, en la franca lingvo, estas tute konstruita per versoj. Nia Esperanta traduko, fare de la franca eminentulo André Cherpillod, estas farita en prozo. En sia antaŭparolo, li klarigis la kialon de sia elekto. Kaj li pravas, miaopinie.

Lia traduko estas flua, natura, perfekte kongrua kun la spirito de la

originalo, kaj certe la perforta enkadriĝo en versoj certe damaĝus la emocian ŝarĝon de la verko. Kaj ĉi tiu ŝarĝo certe estas pli grava ol la rigida versoformo. En sia enkonduko, la tradukinto saĝe klarigas la manieron, kiel li solvis la problemon traduki (aŭ ne traduki) la proprajn nomojn en la teatraĵo. Multaj Esperantaj tradukantoj profitus, legante ĉi tiujn erudiciajn argumentojn.

Unuvorte, leginda libro, kaj pro la originalo, kaj pro la Esperanta vesto. Dankon al “Fonto”, kiu regaligis nin per tia valora volumo! ■



ANNA LOBO

LA NEKREDEBLA HISTORIO DE LA INSULO DE LA ROZOJ

Originala nomo: L'incredibile storia dell'Isola delle Rose

Direktoro: Sydney Sibilia

Aktoroj: Ello Germano, Matilda De Angelis kaj Leonardo Lidi

Lando: Italio

Lanĉo: 09.12.2020

Tempodaŭro: 117 minutoj

En la lastaj monatoj, furora estis la disvastigado de la filmo “La Insulo de la Rozoj” de Netflix inter la esperantistoj. Tiel estas, pro tio ke ĝi temas pri interesa kaj kurioza okazaĵo en historio de Esperanto - Starigado kaj kreado de nova ŝtato en insulo lokita meze de internacia mara regiono, fronte al itala urbo Rimini dum la 60-aj jaroj, kies lingvo estis Esperanto.

Lacigita ĉiam ricevi kritikojn kaj malhelpojn rilate al siaj kreaĵoj, la itala inĝeniero Giorgio Rosa pripenis krei sendependan nacion en insulo ĉe maro kie oni povus esti libera, kreema kaj ne tuŝita de ŝtata burokratio. Kaj kun sia amiko, tiel li faris. Kaj dum kelkaj jaroj ĝi efektive ekzistis kiel nokta klubo, kun kelkaj enloĝantoj kiuj trovis tie ian neston. Cetere, tie eĉ estis starigo de registaro, poŝta servo kaj mono. Malgraŭ malfacilaĵoj, tio bone funkciis... ĝis ĝi alfrontis eŭropunian



kaj ĉefe italan registarojn, kiuj sentis sin minacitaj de la eta nova registaro. La filmo estas en bona etoso, amuza kaj tre kolora. La okazaĵoj, ideoj, kaj personeco de Giorgio ridigas nin. Kaj starigas kvazaŭ troigan komikaĵon, tiom pro la fantazia kaj grandioza ideo ke estas sufiĉe neelpenseble starigi novan nacion, kiom pro la troa reago de apudaj ŝtatoj rilate al iu nova pulvoretita ŝtato. Tiu filmo donas agrablan senton, pro tio ke nia kara lingvo estas menciita tie kaj aperas en ĵurnaloj. Esperantistoj ĉiam estas revemaj, ĉu ne? Ĉiam klopodas cerbumi pri pli bona socio kaj registaro, favoraj al homaj rajtoj kaj apogo al minoritatoj kaj rifuĝintoj. Tiu estas mojosa kaj amuza sperto en la historio de la lingvo. Mi nur bedaŭras ke ĝi ne ekzistas ĝis hodiaŭ. Se vi ankoraŭ ne spektis ĝin, kion vi atendas? Ĝi estas ĉarma omaĝo al Giorgio, al la Insulo kaj al Esperanto. ■



#1

KION

VI

ŜERCAS?

Vidu nian kanalon!

[youtube.com/user/Vivagazeto](https://www.youtube.com/user/Vivagazeto)



#07

Lingva
Provoko

ASSEMBLEIA GERAL



Data: 27/02



Hora: 15h



Virtual: plataforma Jitsi Meet

Mais informações:
easp.org.br/asocio/assembleia



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo